# 25 gvidlinioj de konstrubiologio

IBN Institut für Baubiologie + Nachhaltigkeit

La konstrubiologio ampleksas temojn de sana, daŭripova, natura kaj *belaspekte (sane ) aranĝita vivmedio. Temas pri konstrumaterialoj kaj interna dezajno same kiel ekologiaj, ekonomiaj kaj socialaj aspektoj.

## ENDOMA KLIMATO

- Malaltigu iritaĵojn kaj poluaĵojn kaj provizi sufiĉan freŝan aeron
- Evitu nesalubrajn ŝimo- kaj gistfungojn, bakteriojn, polvon kaj alergenojn
- Uzu neŭtralodorajn aŭ bonodorajn materialojn
- Minimumigu elektromagnetajn kampojn kaj radioondojn
- Preferu radiantan hejtadon

## KONSTRUMATERIALOJ KAJ INTERNA DEZAJNO

- Uzu naturajn, senpoluaĵajn materialojn kun la plej malalta ebla radioaktiveco
- Zorgu pri ekvilibra rilato inter termika izolado, varmostokado, surfacaj kaj ĉambraj aertemperaturoj
- Uzu humidekvilibrigajn materialojn
- Zorgu pri malalta humideco en novaj konstruaĵoj
- Optimumigu la ĉambran akustikon kaj sonizoladon (inkluzive de infrasono)

## INTERNA DEZAJNO KAJ ARKITEKTURO

- Zorgu pri harmoniaj proporcioj kaj formoj
- Antaŭenigu sencaĵojn kiel vidadon, aŭdadon, flaron kaj tuŝon
- Zorgu pri natursimilaj lumkondiĉoj kaj koloroj, uzu sentrembrilajn ampolojn
- Konsideru fiziologiajn kaj ergonomiajn sciojn
- Favoru regionan konstrukulturon kaj metian arton

## MEDIO, ENERGIO KAJ AKVO

- Minimumigu la energikonsumon kaj uzu renovigeblajn energifontojn
- Evitu negativajn efikojn sur la medion dum konstruado kaj renovigado
- Zorge traktu naturajn resursojn, protektu flaŭron kaj faŭnon
- Favoru regionajn konstrumanierojn, elektu materialojn kaj ekonomiajn cirklojn kun la plej bona vivcirkla bilanco
- Zorgu pri optimuma trinkakva kvalito

## EKO-SOCIA VIVSPACO

- Zorgu pri bonan miksaĵon de uzoj en la infrastrukturo kiel rilate mallongan distancon al la laborloko, publikan transporton, lernejojn kaj vendejojn
- Formu la vivspacon taŭge kaj digne por homoj kaj mediprotekte
- Projektu sufiĉe da skvaroj en kamparaj kaj urbaj setlejoj
- Fortigu lokan provizon kaj aŭtarcion, engaĝu regionajn servajn retojn kaj liverantojn
- Favoru konstruparcelojn, kiuj laŭeble ne estas ŝarĝitaj per antaŭaj polucioj, radio fontoj, poluaj emisioj kaj bruo

**Pliaj informoj kaj elŝuti**

baubiologie.de | buildingbiology.com

Sub realaj kondiĉoj ne povas ĉiam esti plenumitaj ĉiuj kriterioj. La fokuso de nia konsidero tial estas optimumigi ilin ene de la individue farebla kadro.

Tradukita de K. Reni Kappenstein, konstrubiologisto IBN

La teksto kaj bildoj rajtas esti reproduktataj senŝanĝe en ĉiuj medioj, kondiĉe ke la fonto estas menciita. © Piktogramoj Christian Kaiser

© Institut für Baubiologie + Nachhaltigkeit IBN